

# REVUO

Monata Aldono al „Esperanto Triumfonta“

NUMERO 11

1923

OKTOBRO

---

---

## Silentu!

La ĉielon kovras pezaj, nigraj nuboj. La vento blovas kaj skuas la senornamajn arbojn. Super la tero jam pasis la akra falĉilo kaj postlasis nur dornajn stoplojn. La tero estas nuda kaj dezerta . . . . . Venos la malvarma vintro!

Nur tiam decidiĝis rozujo, kaj ekfloris unu sola rozo sur branĉo, en la vasta kampo!

Kaj skarлата ĝi estis, tremis kaj vibris jam de malvarmo. Per la tuta forto, ĝi etendis siajn longajn, malfortajn folietojn, por kapti ankoraŭ varman, ankoraŭ helan radion.

Vane! Tro malfrue!

Aliloke, nun estas somero! Aliloke, nun ekvekiĝas nova vivo; nova espero, nova ĝojo! Aliloke floras novaj, freŝaj rozoj — sed ĉi tie devas ĉio morti . . .

„Ha, Dio!“ ploras la rozo, „ekkompatu min! Mi estas tiom juna, mi tiom sopiras vivi! Kial la suno sin kaŝas de mi? Kial devas min mortigi la frosto je mia vivkomenco, kial min kovri la neĝo? Ĉu estas mia kulpo, ke tro malfrue mi estis vokata, ke tro malfrue mi venis? Kial mi devas morti, preskaŭ ne vivinte? Kial mi devas foriri de Via mondo sen sunradio, sen varma, bona momento?“

„Silentu!“ ekfajfis la malbona vento kaj kovris la plorantan floron per polvo kaj velkintaj folioj . . .

Vivanta ĝin entombigis la vento!

Laŭ *J. L. Perec*, tradukis *Harry Spira*.



# Vivo-songô.

Originala rakonto.

Ne tiu estas malfellĉa, kies revoj ne efektiviĝis.  
Malfellĉa estas tiu, kiu neniam revis.

M. d'Ebner.

## I.

Malluma vintra nokto. En la aero sin turnas neĝeroj, promesante baldaŭ kovri la teron per densa, dika mortotuko. La vento blovas, el la proksima arbaro aŭdiĝas kri-bojegoj de lupoj. Ili estas malsataj, ili minacas la vilaĝeton.

Solece staras en la apudvolga stepo eta staciodomo, forlasita, forgesita de malofte preterkurantaj vagonaroj. Apud la staciodomo — malgranda distrikta malsanejo. Solece, malvarme . . .

En tia nokto reviviĝas mortintaj revoj, reaperas en songoj la nerevenigebla juneco. Ĉu tio iam vere okazis? Ĉu tio ne estis nur fantaziaĵo?

La kuracistino, estranta la vilaĝan malsanejon, sidas en sia ĉambro, ripozante post laciga labortago. Griziĝantaj haroj kadrumas la ankoraŭ junan vizaĝon, lumigatan de grandaj nigraj okuloj. Samovaro fajfetas sible sur la vespermanĝa tablo, griza kato murmuretas ĉe la seĝo de sia mastrino.

Ŝi aŭskultas pacience la bojegon de la vento, la malsatkriojn de lupoj el la arbaro. Laca ŝi estas — pro soleco, pro troa laboro, pro la maleblo helpi al tiom da mizero, da malsano, da malklereco, ŝin ĉirkaŭantaj.

Ŝi eniĝas en songojn . . . Reviviĝas, reaperas bildoj el pasinta tempo . . . Songô — la vivo . . .

En malgranda sudgermana urbo studas rusa gejunularo.

Veroĉka estas diligenta studentino, ŝi venis el la malproksima Siberio; ŝi studas medicinan scienccon. Ŝi estas bona kamaradino, helpema, amema. Orfino, ŝi ricevas mizerajn vivrimedojn el sia patrujo, sed ŝi helpas al siaj kamaradoj, eĉ pli malriĉaj ol ŝi mem.

Hodiaŭ ŝi kantis je vesperkunveno gestudentara. Ĉiuj gekamaradoj aranĝis festeton je honoro de Vladimir, forveturonta morgaŭ. La junulo ĵus estis fininta siajn jurstudojn kaj forlasos la urbeton.

Oni kantas, dancas, parolas pri la malproksima patrujo, pri la studjaroj kune travivitaj.

Veroĉka kaj Vladimir diras adiaŭ unu al alia en la strato, antaŭ la domo, kie loĝas la juna studentino. Li longe tenas ŝian etan manon en la siaj, rigardas profunde en ŝiajn nigrajn okulojn.

Sed ŝi evitas la karesplenan rigardon de la sinceraj grizaj okuloj, — ŝia vizaĝo iĝas severa, malvarmmiena.

„Veroĉka“, flustras Vladimir, „diru nun lastfoje: ĉu mi forveturu sola? Ĉu ne estas permesita ia espero?“

Veroĉka decideme respondas: „Jes . . . adiaŭ! Forgesu min!“

Li klinas sian kapon, silente salutas kaj foriras tra la strato . . .

Blankflava luno rigardas kun miro de la malluma ĉielo, kaj la printempa nokto bonodoras je ekflorantaj arboj . . .

Hejme, en sia modesta ĉambreto, Veroĉka vane alvokas sian animforton, sian fierecon pri la severa decido. Ŝi ploras, ŝi sufokiĝas pro ĝemsopiroj.

La loĝejmastrino, bonkora germanino, komplete aŭdas dum duondormo tiujn plorojn. Ŝi mem ĝemas kaj murmuras: „Strangaj homoj, tiuj rusoj! Matene ŝi gaje kantas, vespere ploregas! Nekompreneblaj homoj!“

Ĝis malfrua nokto la plorego skuis la belan, fortikan korpon de la juna siberiano . . . Ŝi malgaje rememoris la strofon de la poeto:

„Kies koro ĉi tie rompiĝis?“

## II.

La decido de Veroĉka estis neŝanĝebla . . . Ŝi forpelos el sia koro la amsenton, ŝi forgesos Vladimir'on . . . Ŝia vivo, ŝia simpatio apartenos nun al mizeruloj, al kompatinduloj . . . Baldaŭ ŝi iĝos kuracistino kaj revenos sian patrujon . . . Tie ŝi faciligos la vivon al suferantoj, subprematoj, al ili ŝi fordonos siajn fortojn, sian energion . . . En la servado al la homaro en forlasitaj, solecaj stepoj, sanigante dolorojn, ŝi kuracos sian propran korvundon . . .

Malproksime, en alta svisa montaro, Vladimir'on atendas alia knabino. Junulino malsana, kvazaŭ destinita al la morto de sia infaneco, bela, kiel revo, blondulino Sonja . . . Ŝin amis Vladimir, antaŭ ol renkonti Veroĉka'n, kaj al ŝi sendis lin Veroĉka nun . . . Veroĉka ne volis aĉeti sian feliĉon per la larmoj de la malfeliĉa junulino . . .

Tie, en la sanigejo, atendas Vladimir'on lia fianĉino; — neniam dubo pri lia amo ĉagrenas ŝian koron . . . Kiel admirinda floro velkonta, ŝi tiriĝas al la granda suno-amo, ŝin vivigonta . . .

Revoj . . . revoj . . . la vivo-songô . . .

Forpasis jaroj . . . unu post la alia . . . Kuraĝe kaj fiere Veroĉka kaŝis de ĉiuj sian korveon . . . Post kelkaj jaroj ŝi finis sian studadon kaj revenis patrujon . . .

Ŝi neniam revidis tiun, kiun ŝi amis . . . Sed ankaŭ la bela blondulino, sopirinta pri sia fianĉo, en svisa montaro, neniam revidis Vladimir'on . . .

La junulo neniam venis al ŝi, kvankam, forlasinte Veroĉka'n, li sin direktis Svislandon. Dumvoje, nova sento ekflamiĝis en lia juna koro, kaj tiun senton li sekvis senreziste, senhezite, forgesinte ĉion en la mondo . . . sekvis por ĉiam . . .

Neniam Veroĉka eksciis, kiu estis la virino, tiel facile rompinta du korojn.



# La venĝo de l' anstataŭanto\*).

De J. B. Schuil,  
eksoficiro de la nederlanda kaj de la nederland-hinduĵa armeoj.

(Represado malpermesita.)

Jansen estis anstataŭanto, unu el la malnova, nun malaperinta tipo, de kiu, antaŭ dek-kvino da jaroj, oni povis renkonti ankoraŭ unu aŭ du en ĉiu kazerno. Dumtage li regule sidis en sia anguleto de la armilejo, ŝmirante pafilojn aŭ frotpurigante sabrojn. Nur post la signalo „Manĝado“ li malsupreniris, kaj oni vidis lin trenmarŝanta trans la internan korton de la kazerno, — vestita per malpura, grasmakulita jako, — havanta sian malnovan soldatoĉapon oblikve sur la kapo. Tuj kiam li venis en la kuir-ejon, li ricevis de la kaporalo-kuiristo, lia plej bona kaj plej fidela amiko, sian plenigitan manĝaĵo-pladeton, kaj poste li tuj ree malaperis en sian armilejon, kie li, la katinon sur siaj genuoj, formanĝis sian miksitan manĝaĵon aŭ siajn grizajn pizojn kaj lardon. Posttagmeze je la sesa li ĉiam eliris el la kazerno kaj revenis akurate je la dek-dua meznokte. Multfoje li estis tiam iomete ebria, sed ĉar li ne faris bruon, la serĝento de la gardejo fortunis ĉiufoje siajn okulojn, kiam la maljuna anstataŭanto ŝanceliĝante eniris la pordegon.

Jansen estis la plej feliĉa, la plej bonsenta kaj la plej bonhumora soldato, kiun oni povas imagi. Li deziris de la vivo nenion plu, ol dumtage frotpurigi kaj vespere trinki sian glaseton. Se estus permesite al li morti kiel armil-frotpurigisto, lia plej granda deziro plenumiĝus. Sed „homo proponas kaj Dio disponas“.

Alia kapitano fariĝis estro de la kompanio de Jansen. La tuta regimento konis tiun ĉi oficiron kiel tre arogantan superulon. Nenia diferenco ekzistis por la severa estro inter juna rekruto kaj anstataŭanto, kiu dum la servado griziĝis. Soldato estis soldato, alian opinion pri tio li ne havis. Iuvespere okazis la malfeliĉo, ke precize tiu ĉi kapitano vidis, ke Jansen, jam je la deka vespere, ŝanceliĝante eniris la kazernon. Jansen iris frate brakon sub brako kun sia amiko, la kaporalo-kuiristo, kiu faris sian eblon por ke Jansen en rekta teniĝo iru tra la pordego.

„Estu singarda, jen la deĵoranta kapitano!“ avertis lin la kuiristo.

„He, he!“ Jansen ridis bonsente, sed tamen li klopodis preterpasi la kapitanon kiel eble plej rigide. Tro „laŭ la reguloj“ li levis sian dekstran manon al sia soldatoĉapo kaj metis sian maldekstran sur la kunkudron de sia pantalono; eble ĉio finiĝus feliĉe, se li ne estus faletinta sur la sojlo.

„Nu, jen mi kuŝas! Pardonu min!“ murmuris Jansen, kiu estis brufalanta precize antaŭ la piedoj de la kapitano.

---

\*) Anstataŭanto estis antaŭ multaj jaroj en Nederlando persono, kiu por mono plenumis la militservadon por iu alia.

Estis tre malfacile por la kaporalo-kuiristo restarigi sian kamaradon. Poste ili duope ŝanceliĝante eniris la kazernon, dum la deĵoranta kapitano severege postrigardis ilin. La sekvintan matenon Jansen estis punata per sestaga ĉelaresto kaj perperdo de sia funkcio en la armilejo. La ĉelpuno lasis lin tute indiferenta, sed la perdo de lia funkcio trafis lian animon. Ne plu frotpurigi, sidante en la anguleto de la armilejo, la katinon apud siaj piedoj, tio signifis por nia anstataŭanto la finon de liaj tagoj. Estinte la plej feliĉa homo, li fariĝis la plej malfeliĉa el ĉiuj mortontoj, estinte la plej perfekta kontentulo — la plej akra grumblemulo.

Ĉiutage li nun vice staris, kiel ordinara novalveninta rekruto, kaj je ĉiu komando „dekstren“, „maldekstren“ aŭ „duonturno dekstren“, li vidigis mienon, kvazaŭ li estus la plej suferanta viktimo, kiun oni povas imagi. Iumatene Jansen estis malaperinta; pro nura tedo kune kun sia amiko, la kaporalo-kuiristo, li estis subite forkurinta. Pli ol du tagojn ili ambaŭ diboĉadis; je la vespero de la tria tago patrolo venis, por kapti ilin. Kaj la sekvintan tagon publikiĝis akuzo kontraŭ Jansen kaj lia amiko, la kuiristo, pro ebrieco kaj interbatado.

Estis la horo de la raporto\*). Nia anstataŭanto staris kun memkontenta mieno antaŭ la pordo de la kompani-oficejo, atendante, ĝis kiam oni enirigos lin.

„Tio havos severajn konsekvencojn por vi, Jansen; dutaga foresto, ebrieco kaj interbatado kun burĝoj!“ grumblis la deĵoranta serĝento.

Jansen tre kontente rigardis la suboficiron kaj subite ekridis.

„Ĉu vi ridas pri tio?“ la serĝento mirigite demandis.

„Ne, mi ploros, ĉar mi havos okazon, diri tion, kion mi devas diri.“

„Kion vi devas diris?“

„Nun mi diras nenion plu!“ voĉridetis Jansen.

La pordo malfermiĝis, kaj la soldato eniris kun la deĵoranta serĝento. La kompaniestro sidis ekstreme severmiene malantaŭ tablo, kaj la ĉefserĝento staris flanke de ĝi, la punregistron sub la brako.

„Ĉu ci forestis dum sesdek horoj?“ la kompaniestro severege demandis.

„Jes, kapitano!“

„Ĉu ci estis ebria?“

„Jes, kapitano!“

„Kaj ci interbatadis kun du burĝoj?“

La mieno de Jansen ekvidigis memkontentecon.

„Jes, kapitano, sed tion mi faris nur por vi, kapitano!“

„Por mi?“

---

\*) La horo de l' raporto estas ĉiutaga horo, je kiu la komandanto komunikas siajn ordonojn por la servo de la sekvonta tago kaj aŭskultas la senkulpigojn de la punotaj personoj.



„Jes, kapitano, tio estis mia devo, kiel soldato el via kompanio!“

„Kion ci babilas?“

Komence la kapitano rigardis sian ĉefserĝenton, poste la deĵoran serĝenton kaj fine la soldaton Jansen.

„Mi ja estis devigita bati, kapitano, ĉu mi volis aŭ ne! La civiluloj incitis min minace, sed mi diris, ke mi ne volas batali! Poste la civiluloj komencis insulti kaj diris, ke mi ne kuraĝas batali pro timo je mia kapitano: Tiu kapitano estas . . .“ kaj nun Jansen komencis laŭvice nombradi tioman kvanton da insultvortoj, kvazaŭ li kolektus ilin el dek vortaroj.

La ĉefserĝento kaj la deĵoranta serĝento staris, havante vizaĝojn purpure-ruĝajn, la okulojn senĉese direktante al la planko. La kapitano nerve mordis siajn lipojn kaj tiris siajn lipharojn.

„Jes, tion mi jam kredas! Ĉesu!“ li akrasone kriis.

„Pardonu, kapitano, sed tio estis nur la komenco! Tio, kio sekvis, estis eĉ pli ol terura! Dum mia tuta vivo neniam ankoraŭ mi aŭdis tian insultadon! Estis nekredeble. Mi diris: »Nu, tio sufiĉas! Eble, ke li estas malica, tamen li estas mia kapitano, kaj mi ne permesas al iu civilulo ofendi lin!« Dirinte tion mi demetis mian jakon, ĵetegis min kontraŭ ili kaj donis al ili porcion da fortaj batoj. Jen la kaporalo-kuiristo povas atesti, mi diras la veron. Kaj nun diru vi mem, ĉu estis eble al mi agi alimaniere? Mi ja devas defendi la honoron de mia kapitano!“

„Bone! Ci povas foriri!“ kriegis la kapitano.

Jansen estis punata per kvartaga enkarcerigo je pano kaj akvo. Sed ĉiu, kiu vidis lin dum tiu tempo, miris pri lia gaja, ridanta mieno. Li aspektis tiel memkontente, kvazaŭ li denove frotpurigante sidus en sia anguleto de la armilejo. Neniam mi vidis soldaton, kiu tiel gajhumore suferis sian punon, kiel Jansen, nia anstataŭanto.

Post unu monato la kapitano de Jansen avancis je majoro. Pri tio Jansen estis tiel feliĉa, ke li regalis per glasetaro da alkoholaĵo la tutan kompanion. Jam unu semajnon post la foriro de la severa kompaniestro nia anstataŭanto denove sidis en la anguleto de la armilejo, la katinon apud siaj piedoj, ŝmirante pafilojn kaj frotpurigante sabrojn. Kaj li konstante restis armilfrotpurigisto, ĝis kiam la tago venis, en kiu li interŝanĝis sian malnovan, grasmakulitan soldatoĉapon je civila ĉapeleto.

El la nederlanda lingvo tradukis fino *J. de Hoope.*



# Homeco.

Originala skizo de Ĉarlo don Kairo.

Mi veturis tre rapide. Ventego ĝemis, neĝo batis mian vizaĝon, sed mia ĉevaleta senlace malproksimigis min. Vestite per varma pelto, sidante en glitveturilo, mi rigardis la neĝkovritan vojon . . . Estis nenio rimarkinda, escepte de mallumaj siluetoj de l' arboj kaj arbetoj en la blanka neĝa kampo.

Mi daŭrigis la veturadon. La ventego plue ĝemis, la neĝo batis, sed mia ĉevaleta transpasis monton. Subite miaj okuloj ekvidis ion nigran, kio sin movis sur la blanka vojo. Tio estis homo. Mi altiris la kondukilojn, kaj la interspaco inter mi kaj la homa estaĵo mallongiĝis. Mi ekkonis la irantinon — ŝi estis kriplulino, kiu senforte sin movis laŭ la blanka vojo . . .

Strangaj pensoj venis en mian kapon: Kion fari? Ĉu veturigi la kriplulinon aŭ ne? Ĉu aŭskulti ŝiajn ĝemojn kaj dolorajn rakontojn? Respondon mi ne sukcesis trovi, ĉar mia ĉevaleta rapide antaŭiĝis.

Jam de malproksime mi vidis, ke la brakoj de l' kriplulino petante leviĝis supren al la ĉielo, por peti min en la nomo de l' ĉiopova Dio.

Kion fari? — —

Denove mi altiris la kondukilojn, kaj mia ĉevaleta rapide preterpasis la kriplulinon. Mi ne rigardis ŝin, sed miaj oreloj aŭdis ŝiajn riproĉplenajn vortojn, kiuj estis dolaraj kaj petantaj.

„Estu homo kaj veturigu min . . .“

Jes, homo! — —

La ventego ĝemis, la neĝo batis, sed mia ĉevaleta rapide malproksimigis min. Mi eĉ pli profunde eniĝis en la glitveturilon kaj kiel timigita besto konservis la malpacon en la brusto.

Subite vekiĝis en mi la homeco, kaj mi reveturis, por preni en mian glitveturilon la kriplulinon, sed ŝi . . . ŝi estis jam mortinta pro frosto kelkajn paŝojn de la loko, kie mi ŝin preterpasis . . .

Homeco! — —

.....

## Demando el la sudo . . .

Mevobirdet', se flugas Vi al nord',  
Ho flugu kun Vi mia ama vort'!  
Ekfrapu la fenestron de l' knabin',  
Demandu ŝin, ĉu ŝi forgesis min?

Demandu ŝin, ĉu jam en ŝia kor'  
Ne vivas plu memor' pri ama hor'?  
Demandu ŝin, ĉu ankaŭ en la nord'  
Nur estas ludo romp' de l' ama vort'?

Demandu ŝin, ĉu jam en nova jar'  
Ne venos ni plu kune kiel par'?  
Respondu ŝi sincere al la sud',  
Ĉu ĉio, ĉio estis vanta lud'?! —

## Respondo el la nordo . . .

Mevobirdet', se flugas Vi al sud',  
Ho estu Via flug' facila lud'!  
Atingu lin per voĉo de l' knabin'  
Kaj diru al li, ke mi amas lin!

Ho diru, ke en fund' de mia kor'  
Memoro vivas pri la ama hor'!  
Ho diru al li: spite ĉia fam'  
Fidele brulas por li mia am'.

Kaj se post jar' revenos la somer',  
Ekkrevos por ni la glaci' de l' ter',  
Sub sunradi' ekfluos varma ond',  
Kunvenos ni por fest' en ama rond'! —

P. B.



## Letero el la bataalkampo.

Alkuru el la kamparo, patro, kaj vi, patrino, malsupreniru al la pordo de via domo! Alvenis letero de via kara filo!

Estas aŭtuno; pro milda vento de oktobro la arboj movas siajn malmultajn foliojn pli kaj pli flaviĝantajn kaj ruĝiĝantajn. La pomoj maturiĝas kaj la vinberaroj brilas pompe inter la vitaj folioj. Ĉu vi ne sentas la parfumon de la poligono, sur kiu zumas abeloj? Supre, la ĉielo estas tiel kvieta kaj diafana post la pluvo! Malsupre ĉio estas trankvila, bela kaj viva: la kamparo die prosperas.

Jes! Tie, en la kampoj ĉio prosperas bone . . . sed nun alkuru, patro; kaj vi, patrino, malsupreniru tuj al la pordo!

Ŝi jam rapidas, kun stranga antaŭsento, per balanciĝantaj paŝoj, nek ordiginte siajn blankajn harojn, nek aranĝinte la ĉapelon.

La koverto estas rapide malfermata. Ho, la skribaĵo ne estas de l' amata filo; nur la surskribo estas de lia mano: fremda mano skribis por li.

Kia frapo al la patrino koro! Ĉio ŝanceliĝas kaj ondas antaŭ ŝia rigardo, fajreroj kaj mallumoj blindigas ŝiajn okulojn; ŝi nur povas distingi la frazon: „Li eble fartos pli bone . . .“

Ve, malfeliĉa knabo, li ne fartos pli bone, nek, eble, li bezonas farti pli bone, tiu simpla animo! Dum la gepatroj ploras ĉe la doma pordo, li mortas.

La sola filo mortis.

Kiu bezonas farti pli bone, estas la patrino. Malgrasiĝinte en nigra vesto, dum la tago ŝi preskaŭ ne manĝas, dum la nokto ŝi dormas maltrankvile; ŝi sin vestas plorante, havante nur unu deziron: foriri! Malaperi nevidite de iu hejme; fordoni la vivon kaj malaperi . . . por iri al li, por lin serĉi, por lin trovi, por esti ĉiam kun li, kun sia sola mortinta filo.

El la itala lingvo tradukis *Lina Caporali*.

\*\*\*\*\*

## El supraj sferoj.

El supraj sferoj, kie la spirito  
Senlimon tranĉas per fulma zigzago,  
Vi koron venis . . . kiel luma sago,  
Vi — pura sento kaj pura ekscito.

Kaj lumo via ne sur la granito  
Metis la semon, ĉar venis la tago,  
Kiam el dormo vekigis imago  
Kaj sur la frunto aperis medito . . .

Ĉar venis tago, kiam en animo  
Sopir' vekigis al spacoj sen limo,  
Kiam al suno leviĝis pupilo . . .

Tiam vi iĝis de vorto konfido,  
Nesto surroka de juna aglido  
Kaj la potenca, senlaca flugilo.

*Stanisław Braun.*

# Unuformeco.

De *Bela Toth.*

En Pera, la eŭropa antaŭurbo de Konstantinoplo, dum vintra nokto veninte el ludejo mi eniris en la plej modestan bierejon, por ensuĉi iom da dormiga trinkaĵo, kaj ankaŭ tial, ĉar antaŭ hejmeniro estas agrable ekriprozi ie, kie regas silento, pureco kaj milda lumigo; kie ne estas rumanaj princoj, polaj grafoj, palavoĉe sibilantaj orfeon-primadonoj, malpuraj tablotukoj, bovinciteruĝaj muroj kaj blindigaj gaslumoj. Ĉiu diboĉulo povas atesti, ke tiaokaze unu aŭ du *pale ale* estas vera purigilo; ĝi forlavas el la homa animo la ĵus viditajn malpuraĵojn, multajn abomenaĵojn. La kelkaj dumnoktaj biertrinkantoj, sidantaj diskrete unuope ĉe la tabloj, estas agrablaj konsolantoj kaj pruvas, ke ekzistas ankoraŭ honestaj bravuloj en ĉi tiu mondo. Ĉar, kiu post nokto-mezo je la dua rigardas la zumon de la blanka bierŝaŭmo sobre, medite, tiu estas nepre pacama, trankvila ulo, kies animon ŝarĝas neniam malbono, kiu ne timas la morgaŭon kaj baldaŭ dronos en senkulpa, trankvila sonĝo, kiel infano. Tiuj noktaj, silentemaj biertrinkantoj estas senescepte bonuloj.

Ĉe la apuda tablo sidis trankvila maljunulo. Mi estus ne rimarkinta lin, se pro soifo li ne perdus sian trankvilecon. Vane li ripetadis longe kun pacienco: „*Garçon, un bock!*“, la dormemaj kelneroj ne alportis por li bieron. Fine li ekkoleris je ili, kriante samtempe almenaŭ seslingve, mikŝante per portugala, itala, germana la lingvojn grekan, turkan kaj francan: *Ferete mi zithon! Caramba! Arpa su getir! Schweinekerl! Ancor un bicchiere di birra! Pezevenk! Un bock!* — Ĉiuj ĉi frazoj signifis, ke li soifas bieron.

Mi rigardis la poliglotalon je biero. Li estis bela, razita, griza maljunulo. Juĝante laŭ lia bruna haŭto, mi opiniis lin sudfranco aŭ hispano, kvankam liaj okuloj estis helbluaj. Li portis altan, ruĝan fezon kaj kafkoloran jakon. Ĉi tiu nordamerika ĉasvesto kurioze kontrastis la turkan kufon. Sur la piedoj li havis ĉinajn ŝuojn kun feltplandoj dikaj je kvin fingroj; ĉirkaŭ lia kolo estis hinda silkotuko. Lia vasta pantaloneo rememorigis vestaĵon de norvegaj maristoj.

En Konstantinoplo, en tiu granda „maska balo“, oni povas vidi tiom da strangaj figuroj, ke fine oni tute ne atentis ilin; sed ĉi tiu groteska estaĵo vekis tamen mian scivolon.

La mirinda framasoneco kunligas tiujn noktajn, silentemajn trinkulojn. Tial jam post dek minutoj mi konis mian maljunan najbaron.

Mi surpriziĝis aŭdinte, ke li estas redemptorista misiulo, ĉar li nepre ne havis aspekton de pastro. Ĝuste nun li venis de l' insulo Ceylon kaj intencis iri al Persujo. Sed tie li restos ne longe, ĉar li reiros aŭ Japanujon aŭ Sud-Afrikan, laŭ ordono

de siaj superuloj. Cetere povas okazi, ke oni sendos lin al la aŭstraliaj insuloj. Ĉion ĉi li diris tiel apatie, tiel indifere, kvazaŭ la temo estus pri malgranda ekskurso.

Ni parolis itale. La lango de l' misiulo moviĝis rapide, sed ĉe kelkaj esprimoj li ekbalbutis, kvazaŭ li devus serĉadi en la vortaro de sia memoro. Ofte li uzis ankaŭ francajn, hispanajn kaj portugaliajn vortojn, kiuj perdiĝis en la parenca itala vorto-torento, sed kelkfoje li miksis en sia parolo anglajn, germanajn, turkajn kaj vortojn el lingvo tute nekonata al mi. Tiaokaze li rapide reiris al la itala kaj rigardis min, kvazaŭ li petus pardonon pro sia forgesemo. Foje li diris tutan frazon en mirinde kurioza fremda lingvo kaj, kiam mi rigardis lin per demandaj okuloj, li klarigis ridetante:

— Ne koleru pro mia malbona kutimo! De tridek jaroj mi vagadas en la mondo, kaj mi devas paroli almenaŭ dudek lingvojn alterne. Mi estas franco, sed mi mem ne povas diri, en kiu lingvo mi pensas. La sennombre multaj vortoj intermiksiĝis en mia kapo aŭ, pli ĝuste: la pli fortaj venkis. T. e. se mi devas esprimi ion, ĉiam tiu vorto aperas en mia menso, kiu — laŭ mia opinio — pentras la ideon plej ĝuste. Ekzistas kelkcento da aferoj, kiujn afrikaj kaj aziaj lingvoj povas esprimi pli ĝuste ol la perfektaj latin-idiomoj. Foje ĉina, foje tamula, foje japana aŭ tatara vorto forigas el mia buŝo la italan; pri eŭropaj lingvoj mi eĉ ne parolos, ĉar ili prezentas sin po dekoj. Fine tio ne estas malfacila, se oni parolas kun eŭropanoj pri eŭropaj aferoj. Ĉe mi triumfas ĉiam la taŭgeco. Ĉi tiu mia lingvomiksaĵo estas tre perfekta, kuniĝas en ĝi animforto de pli-malpli dudek popoloj . . . . Mi rimarkis, ke vi miris pri mia stranga vestaĵo. Sinjoro, ĉi tiu estas la plej prudenta vestaĵo de la mondo. Ĝi similas mian lingvon. Ĝi enhavas ĉion bonan kreitan de diversaj civilizacioj. Ĉemizo el java silko estas la plej bona; ĉina sandalo estas la plej oportuna pied-vesto, neniam oni laciĝas en ĝi. Amerika ledjako estas la komforto mem. Fezo estas beno, ĉar ĉiu saĝulo razigas la kapon. Ne ekzistas popolo, kies vestaro enhavus tiom da bono kiom la mia. —

Mi estis tiam juna, al aventuroj sopiranta homo. Ĉi tiu mondvidinto plenigis min per envio kaj interesiĝo. Min ravis Oriento. Mi opiniis ke, transpaŝinte la sojlon de Eŭropo, mi havos antaŭ mi novan, fremdan, brilan fe-universon, ĉe ĉiu paŝo pli mirinda, pli raviga, pli surpriza. Timeme mi demandis *Père Mathieu*'on, kiomfoje li ĉirkaŭvojaĝis la teron.

Li respondis kun teda mansigno: — Kvin- aŭ sesfoje, mi mem jam ne scias. Ĝi estas malŝparita tempo. —

Mi sciis, ke famaj vojaĝantoj ŝatas fanfaroni kaj ŝajnigi indiferecon. Li rimarkis mian malplaĉan surpriziĝon kaj post laŭta *garçon, un bock!* - krio li komencis pravigi sin.

— Ne opiniu, ke mi volas fanfaroni! Iam ankaŭ mi ekvojaĝis kun esperplena brusto, por vidi la grandegan, multkoloran, senfine ŝanĝigantan mondon. Sur la ŝipo mi forigis horojn de l' dormo, por preterlasi nenion indan rigardi. Sed dum la unua vojaĝo jam vekigis en mi la konvinko, ke la formoj de la maro kaj tero estas ĉie la samaj. Oceano egalas Adrion, Adrio la Flavan Maron: akvegoj, kiujn kolorigas la suno, nubirado jen tia, jen ĉi tia. Ankaŭ la tero estas ĉie la sama. Komence surprizis min, ke inter la nordaj bordoj de Afriko kaj la itala orienta kontinento ne estas diferenco; ke Kordileroj estas kvazaŭ la svisaj neĝmontoj mem; ke la sablo de Egipto estas tutsama kiel la danaj sablaĵoj. Mi seniluziigis vidante, ke tero ĉie estas tero, monto ĉie nur monto. Mi sentis maldolĉan trompiĝon, kiam la konturoj de iu aŭstralia insulo ŝajnis al mi, kvazaŭ estus leviĝinta el la maro Korsiko aŭ la insulo Elba. Supre la ĉielo estas ankaŭ ĉie samforma. Ĉu lumas sur la nigra firmamento la brilanta bildo de l' „Suda Kruco“ aŭ nia „Granda Urso“ — kredu, sinjoro, tio estas tre malgrava diferenco, ĉar la universo estas unu kaj ne ŝanĝigema. Komence mi miris, ke suno kaj luno sub la ekvatoro estas pli brilaj kaj pli grandaj ol ĉe ni; sed baldaŭ mi alkutimiĝis, ke tamen ili estas niaj malnovaj suno kaj luno, escepte etan diferencon. Komence la floraro de l' Sudo tre impresis min. Ho! la palmaretoj, la praarbaroj, la ĉinaj mongrov-plektaĵoj, la hindaj arbetoj estas belegaj! Sed baldaŭ oni komencas senti, ke ĉi tiu granda novaĵo fariĝas kutima, ke ĉiuj mirakloj de la vegetado, en la universo de l' kreskaĵaro, estas nur ŝtupoj, nuancoj de la ŝimo ĝis la cedro libanona. —

Nun la maljunulo ekfumis strangan angulecan cigaron.

— La bestaro? Certe oni miretas, kiam kamelo aŭ elefanto unuan fojon venas renkonte sur strato, kiujn ĝis tiam oni vidis nur en zoologiaj ĝardenoj. Renkontiĝo kun la unua ĝiba bovo aŭ tigro estas ankaŭ surpriza, sed la bestaro niveligas antaŭ nia rigardo eĉ pli facile ol la kreskaĵaro. Baldaŭ ni rigardas en Aŭstralio la kenguruon, en Ameriko la simiojn, en Afriko la rinoceron tiel egalanime kiel hejme la katon, ĉevalon, sciuron . . .

— La konstruaĵoj? Unu, du jarojn veturinte, baldaŭ oni spertas la enuigan veron, ke domo estas nur domo. La venecia Markus-preĝejo, la renesanc-palacoj, hindaj idol-pagodoj, ĉinaj turoj, islam-moskeoj, vigvamo de l' indiano, tendo de l' eskimo, ĉiuj estas gradoj de la homa civilizacio, de la homa lertecco; sed ne unu estas sufiĉe forta elŝiri nin el ĉi tiu unuforma mondo kaj porti tien, kie oni povus diri: Jen estas nova, alia mondo, ne la nia. Orumita marmor-panteono kaj ŝlimkabano de egipta „fellaĥ“ estas du ekstremaĵoj, sed inter ili ekzistas seninterrompa transiro, kiu faras ĉion la sama. —

La pastro klinis sian kapon, enpenŝiĝe rigardante aeren; sub liaj pupiloj estis videbla la okulblankaĵo, kvazaŭ li rigardus tre malproksimen.






## Psikaj problemoj.

### Kurioza bildo aperinta en okulo de mortinta ĉevalo.

En la printempo de la jaro 1914, iu terkulturisto el la vilaĝo Vilosnes (Francujo) nomita Lamort, perdis pro morto sepjaran ĉevalon kun tre hela griza felo. La besto mortinta kuŝis kaj estis tuj enterigota. Granda estis la miro de la loĝantoj de la vilaĝeto, kiam ili ekvidis en la ekstera angulo de la maldekstra okulo de la besto bildon de busto de iu junulino. Tiu bildo, kiu estis multe pli preciza sur la okulo mem ol sur la fotograf-



*Bildo de la kapo de mortinta ĉevalo sur kies okulo estas definitive stampita, pro nekonataj kaŭzoj, la bildoj de konata junulino kaj maljunulo. Strangaĵo certigita de sinjoro Didier el Dun s/Meuse (Francujo), bestkuracisto, Kavaliro de la Honorligo.*

aĵo farita de s-o Parisse, fotografisto, ok' horojn post la morto, prezentis la hararon kaj la vizaĝon de fraŭlino Laurent, filino de l' instruisto, loĝanta kontraŭrigarde al la ĉevalejo de Lamort, kaj ankaŭ la helkoloran taliveston, kiun ŝi sola inter siaj kunulinoj konstante surhavis.

Dum informiĝa esploro, kiun mi faris surloke en la jaro 1920, oni rimarkigis al mi, ke la ĉevalo neniam vidis tiun ĉi junulinon, kiu forloĝis el Vilosnes dum la jaro 1908; oni eĉ aldonis, ke ĉu pro amo, ĉu pro antipatio, la ĉevalino, patrino de la mortinta besto, montris, kiam ŝi renkontis fraŭlinon Laurent, tiel danĝerajn agmanierojn, ke la celata junulino rapidis al la plej proksima domo. Ĉar la lastaj monatoj de la restado de



fraŭlino Laurent en Vilosnes samtempigis kun la gravedeca periodo de la ĉevalino, oni povis konsenti, ke la rigardo de la patrino fiksige sur la okulon de la feto la vizaĝon, kiu pro ia nekonata kaŭzo estis loga aŭ malloga por ŝi.

La valoro de tiu anatomia fenomeno, kiun kompletigas ankaŭ la esprimoplena bildo de iu maljunulo en la sama punkto de la okula korneo, estas science pruvita per la atesto de la koncernaj personoj.

Unuflanke mi ne povis kontroli la memecon de la tie-loginta maljunulo, kiun neniu revidis de post la invado de la jaro 1914; aliflanke fraŭlino Laurent, estante instruistino apud Bar-le-Duc, ĉefa koncernatino, de kiu mi petis kelkajn precizaĵojn, tute ne povis, pro la detruo de Vilosnes, apud Verdun, komuniki al mi iun el siaj malnovaj fotografiaĵoj. Ŝi sciigis ankaŭ min, en dua letero, ke la junulina busto povus ankaŭ esti tiu de ŝia fratino, kun kiu multaj alivilaĝanoj, erarigitaj de frapanta simileco, konfuzis ŝin.

Ni do rigardu kiel legendan la similecon, kiun la popolamaso pretendis inter la instruistino kaj la ĉevalokula fotografiaĵo. Tamen, post kiam ni estos per tiu cedo obeintaj al la postuloj de serioza dokumentesploro, la stranga fakto de la bildo de virina busto sur la korneo de la okulo de iu ĉevalo restas efektiva.

Kia nu povas esti la scienca klarigo pri tio?

La kaŭzo de la morto de la besto estas plej ordinara: ne temas, ekzemple, pri ia kazo de fulmobato, de ia kaprico de la fulmo estiginta fulmomortigajn efikojn: la besto mortis, se oni fidis s-on Didier, bestkuraciston en Dun-sur-Meuse, kiu kuracis ĝin, pro anemio kaj pro koraj difektoj.

La veterinara scienco ja instruas, ke la tre hele griza felo de ĉevaloj estas ŝprucmakulita per makuloj el nigra pigmento kun senregula formo, sed tiu ĉi konstato ne lumigas la problemon; ĝi ne klarigas, kial la sklerotika koloraĵo formis regulan desegnon kvazaŭ obeante al ia inteligenta direktado. Oni ankaŭ rajtas konsenti, ke samaj fenomenoj, kiel tiu ĉi, kiu unuafoje, pro nura hazarda okazo, rimarkiĝis, jam efektiviĝis nerimarkite ĉe la bestoj kaj ke ĝi superas la samnaturajn faktojn, kiujn oni observis ĉe la homaro. Efektive, laŭ mia scio, ne parolante pri la nenormalaj vegetaĵoj de kaprica gravedeco, neniu virino stampis fotografan bildon sur sian novnaskitan idon.

Konklude, konstatante la mankojn de la klasika scienco, mi imagas, ke, kiel ajn malgranda ĝi estas, la spirita elemento de la ĉevalo povis, dum ia momento de ĝia vivo, koncentrigi sian „odikan“ forton sur iun plejpotencan „ideiĝon“, kaj ke persista sugestio vole kreis perfektan postsignon de busto de ofte rigardita virino. Ĉion konsiderante, la pigmento estas nur koloriga substanco: kiu do regis la penikon?

*Jules Thiébault*, Carignan (Ardennes), Francujo,  
membro de la psika societo de Nancy.

**Enigmoj.****Nombra enigmo.**

1	2	3	4	5	6	7	8	9
2	6	4						
3	2	6	8	9				
4	1	4	8	9				
5	9	7	8	9				
6	8							
7	6	3	9					
8	4	5	6	8	9			
9								

Oni anstataŭigu la nombrojn per literoj tiamaniere, ke la unua horizontala kaj vertikala vicoj nomas eŭropan grandurbon, la ceteraj horizontalaj vicoj nomas: 2. mallongigo por grava Esp. organizaĵo, 3. muzikpeco, 4. ekleziulo, 5. grava trafika institucio, 6. sufikso, 7. arkitektura esprimo, 8. ornamo de muroj, 9. vokalo.

**Geografia Silab-Enigmo.**

a — a — ad — ba — be — brin —  
ca — di — dir — dis — dor — dos —  
ga — han — is — king — la — man —  
nan — pa — rho — sa — sal — san —  
si — va.

La Esperantistoj estas konataj kiel spertuloj en geografio. Do estos facile por ili solvi speciale ĉi tiun enigmon, kunmetante la silabojn tiamaniere, ke rezultos sekvantaj urboj: 1. mezamerika urbo, 2. afrika urbo, 3. ĥina urbo, 4. hispana urbo, 5. persa urbo, 6. itala urbo, 7. maroka urbo, 8. insulo kaj urbo en Egea Maro.

La komencaj literoj de ĉiu urbo, legataj de supre al malsupre, formas la nomon de afrika urbo, kaj la finaj literoj, legataj de malsupre al supre, tiun de ĥinda urbo.

(Solvaj en la venonta numero.)

**Solvo.**

Solvo de la silab-enigmo en la septembra numero.

TaJo  
ErAto  
RiPo  
TiAro  
RaNo  
EbUro  
MaJo  
OrO

Tertremo, Japanujo.

\*\*\*\*\*

**Humoro.****Utila libro.**

La juna poeto. — Sinjorino, ĉu vi ricevis la volumeton, kiun mi hieraŭ sendis al vi?

La markizino. — Jes . . . via libro enhavas tre plaĉajn poemojn . . . sed . . . (Al sia filino:) . . . Kie ĝi estas nun?

La filino. — Ĉu vi ne memoras, patrino? Nia tablo havis unu piedon pli malaltan ol la tri aliaj; kiam vi metis, hieraŭ vespere, la libron sub la piedon, la tablo restis tute senmova.

**Virinoj ne bezonas fremdan lingvon.**

— Mia filino studis francan kaj anglan lingvojn; nun ŝi studas ankaŭ germanan.

— Male, mia filino studis nenian lingvon; ĉar la patro diras, ke virinoj parolas jam sufiĉe kaj ne bezonas ankoraŭ fremdajn lingvojn.